




# ANTAUJEN

## ENHAVO

Julio - 2002 - N° 28-a  
ASTURIO

- 2...Nia Regiono
- 3...Kanto de L'espero
- 4...Anekdotoj
- 5...La Ĵusveninto (2)
- 6...Legendo de la Mortoĉaro
- 7...Eŭropo
- 8...Jimmy
- 9...Mesaĝoj
- 10-11 Artefariteco
- 12..Folkloraj Vestaĵoj
- 13..Garcilaso de la Vega
- 14..Stelo de la Frateco
- 15..Amuzaĵoj
- 16..E. Centro



**REVUO DE LA AVILESA  
ESPERANTO - GRUPO**



# NIA REGIONO

## KUJDEJRO

Kujdebro (asturlingve 'Cuideiru', hispanlingve 'Cudillero') estas marborda vilaĝeto tre konata pro sia specifa dialekto de la astura lingvo, nomata 'pixuetu' (prononcu 'piŝuetu'). Ĝi entenas proksimume 2.000 geloĝantojn, multaj el ili dediĉataj al fiŝkaptado. Ĝi havas iujn antikvajn konstruaĵojn kiel la kapelo 'Capilla del Humilladero', kie alitempe oni diskutis pri juraj aferoj kaj kien la ekzekutotojn oni portis antaŭ ol iri en la skafoldon. Estas tre famaj en Asturio ĝiaj festoj, tiuj de Sankta Pedro kaj Sankta Pablo (kaj tiu populara de 'San Pablín' (Sankta Pauleto), aldonita post la du antaŭaj). Dum tia evento famas same la disvoko de L'Amuravela, kiun fiŝkaptisto vestita tradicie alparolas al arego da homoj. Per tiu preleĝo li esprimas, en pixuetu kaj perime, ŝercojn kaj spritaĵojn rilate al la okazaĵoj de la jaro, al la kritiko de sociaj sintenoj, ktp. Tre konata estas ankaŭ unu loka versio de la danco 'prima' (tradicia danco de tuta Asturio) nomata de Santana (nomo de loko rilate al Sankta Ana). Kujdebro havas tre kuriozan domdisponadon. La etaj domoj stariĝas kvazaŭ ŝtuparo sur monteto, adresantaj al la marhaveno, kie troviĝas festema zono de manĝejoj kaj trinkejoj. En ili oni povas gustumi tipajn fiŝajn pledojn, kiel merluso, bonito kaj krustuloj. Meritas mencio, cetere, ĝia faro, kiu inspiris kanton konata de ĉiuj asturanoj. La 'piŝuetoj' ja estas muzikamaj! Unu el la plej famaj asturaj folkmuzikaj grupoj, Llan de Cubel, devenas de ĉi tie. Por fini, strofon de la danco Santana: "Dum Kujdebro vivu kaj daŭru la Fonte'l Cantu [vilaĝa fonto] iros Sankta Petro al La Ribera [loka nomo] kun ĉiuj aliaj sanktuloj."

### Estraro de ANTAŬEN

Honora Prezidanto: **Nicolás Muñiz**

Prezidanto: **Cezaro García**

Sekretariino: **M<sup>a</sup> Luisa Menéndez**

Direktado kaj Desegno

revuo Antaŭen: **Císimo Rabanedo**

Kasisto: **Luis González**

Bibliotekistino: **M<sup>a</sup> Isabel Murillo**

Gckomitatanoj:

**M<sup>a</sup> José Alvarez Faedo**

**David Menéndez**

**Eva González**

**Gene Alvarez**

**Lisa Ejarque**

**Daise Murillo**

### Nia adreso

Llaranes Poŝtokesto 51 (CP 33460)

AVILES Asturias

Tfn 98 554 11 27

esperanto@asturies.org

Depósito legal:

Nº AS 1398 (9)

N.I.F. 33677378

Subvenciita de la Registaro  
de la Avilesa Municipo

La Redakcio

## KANTO DE L'ESPERO

La espero estas nia patrino en la horoj de la vivo  
En kiu genuiĝas l'animo  
tremanta pro la emocio.  
Ĝia pieco karesas kaj estas balzamo en la vundo  
kiu ĉiam malfermitas de malplenumita anhelo  
de la koro.

La espero estas sankta... Enamigita hirundo  
revenanta al la olda nesto, ĉiam nova en la amo.  
Ĝi estas lumo superfluanta kiam rompas la ektagiĝo  
blindumante niajn okulojn kun sia magia brilo.



Kiel halto sur la vojo, kiel sonĝo en la ripozo,  
la luktanto sin rifuĝas en sia patrino sino  
kaj ridetas, kiel ĉielo reflektita sur stagnejo  
kaj enamigante lin per sia kristala rido.

Verkis **Luis Menéndez** "LUMEN"  
Esperantigis **M<sup>a</sup> Luisa Menéndez**

## ANEDOTOJ



La franca romanisto Pierre Loti vojaĝis tra Elsazo kiam li vidis en farmobieno belegan hundon kaj deziris aĉeti ĝin.

- Por kio vi deziras la hundon? - demandis la posedanto de la besto.

- Mi kunportos ĝin al Ameriko...

- Neeble! Mi ne volas disigi min de mia hundo.

Malmulte da tagoj poste, Loti sciigis ke lia najbaro estis aĉetinta la hundon po kvanto pli malgranda ol tiu kiun li estis ofertinta. Kaj li, ofendita, iris vidi la farmulon.

-Vi diris al mi ke vi ne deziris vendi la hundon...

-Ne, ne - la farmulo interrompis lin -. Mi ne diris ke mi ne volas ĝin vendi, sed ke mi ne volas disigi min de ĝi. Kaj mi estas tre trankvila: mia hundo estas vigla, kaj post du aŭ tri tagoj li ja revenos en mian hejmon. Tamen, se hazarde mi estus vendinta ĝin al vi por kunporti al Ameriko, ĝi certe ne estus povinta transiri la maron por kunveni kun mi.



La filozofo Diogeno diris iam al Aristipo:

- Ĉu vi vidas, kion mi faras? Se vi scipovus nutriĝi el brasikoj vi ne bezonus flati la eminentulojn.

-Kion do? -respondis Aristipo-. Se vi scipovus flati la eminentulojn vi ne bezonus nutriĝi el brasikoj.

*Daise Marillo*


## LA ĴUSVENINTO (2)

Multajn el la adresoj de miaj gekonatoj kaj geamikoj mi estis perdinta. Sed subite la trovi Enol-ekĝojiĝis vidi post hejmon,



mi rememoris tirkeston en kiu mi kutime gvardis preferatajn objektojn. Tiel mi atingis la manieron on, unu el miaj plej bonaj kunuloj. Li multe pro tio, ke mi vokis, kaj feliĉe li konsentis min malmultaj horoj. Fakte mi tiel reiris en sian kie ni tiom ludis kiam infane. Li ne antaŭlonge

heredis la domon de siaj forpasintaj gepatroj, kaj, enirinte, mi rekonis iujn detalojn de tiu iamaniere kara al mi loko. Surprizis al mi kiel la perspektivoj ŝanĝiĝis - mi tre estis ĝuinta la vidadon ekde tiu oketaĝa konstruaĵo.- Nun, ekde la kuirejo, plu ne videblis la altaj fornoj de Ensidesa, la ferindustria entrepreno kiu donis laboron al multaj urbanoj. Grandan parton de la instalaĵo de la fabriko oni malkonstruis por liberigi grundon por alvenontaj modernaj industrioj. Mi bedaŭris sufiĉe tian maleston, sed ankaŭ plaĉis al mi ke la enfluejo montris sin pli klare ol antaŭe. Ekde la salono, tamen, oni vidis multajn novajn edifikaĵojn, iuj el ili, kvankam moderne, bonaspektaj. Ili kaŝis la monton Gorfoli', kaj la verdegajn kampojn kiuj al ni inspiris iam, kiam ni ekverkis niajn unuajn literaturaĵojn. ĉesintis labori en Ensidesa antaŭ iuj jaroj, ne propravole, sed ŝulde al la "restrukturigo" far Li starigis trinkejon kaj tiun nokton ni altagrade nian renkonton. La lokon li "Diego-n", laŭ la nomo de sia fileto.



Enol' certe la estraro. celebris nomigis

- Eksciuj! -li diris al mi- Ĉu vi scias ke tiu nomo havas kuriozan signifon? Antaŭ semajno kliento diris al mi ke ĝi sencas ion kiel "granda dio" en Esperanto. Ĉu vi iam aŭdis pri tiu lingvo?

Fakte mi estis aŭdante tro ofte pri tiu, lastatempe.


DOKTORO ATENDANTO

# LEGENDO DE LA

## MORTOĈARO

La onklino Maria vivis en Asturio. Ŝi estis maljunulineto kiu konserviĝis tre forta malgraŭ sia aĝo kaj havis multe da energio. En ŝia hejmo oni faris la proprajn taskojn de la loĝantaro, la porkobuĉado, la ŝpinado, ktp. Iun tagon, kiam najbarinoj alvenis por helpi ŝin, ili trovis onklinon Marian tre timigita.

- Kio okazas?



- Ve! Mi ĵus vidis la Mortoĉaron pasi super la domo de Jozefo (Jozefo estis najbaro kiu trovis sin sufiĉe malsana).

Ŝiaj amikinoj trankviligis ŝin dirante ke ŝi estas tre sana kaj ke la ĉaro ja venas por kunporti la bedaŭrindan najbaron.

La sekvantan tagon, kiam ĉiuj virinoj estis kuniĝitaj laborante, onklino Maria alproksimiĝis al la kuirejo por zorgi pri la bolado de kolbaso...

- Nu, aspektas ke Jozefo sufiĉe plisanigis...

Onklino Maria falis subite sur la plankon, kaj kiam ŝiaj amikinoj iris ŝin helpi, ŝi jam estis mortinta.

*Ludoviko*

# Eŭropo kaj la Enmigrado



Dum la lastaj jaroj ni, eŭropaj civitanoj, estas vivante enmetitaj en fenomeno kiu, se ni pensas pri tio, estus malfarebla nur antaŭ malmultaj jardekoj. Mi parolas pri la Eŭropa Unio. Tio kio komence povis esti bona ideo, pli centrigita sur kulturaj interŝanĝoj de la diversaj nacioj kiuj konstituas ĉi tiun komunan spacon, Eŭropo, fariĝis fine ekonomia unuaĵo.

Ni eŭropanoj, ne proksimaj al memkonsidero kvazaŭ sama nacio, daŭre rigardas unu la alian kvazaŭ veraj nekonatoj. Ni havas nenion komunan krom nia socio de la bonfarto malfavore al la plej malriĉaj nacioj, niaj troaj kaj malpravaj konsumadokutimoj, la ununura monero kaj, kiel ne, rasa diskriminacio. Malfeliĉe la fenomeno de migrado, kiu alportas al niaj limoj milojn da viroj kaj virinoj serĉe de nova vivado kun digna laboro kaj sen politikaj persekutoj estas unu el la malmultaj aĵoj kiuj estas atingante unuiĝi la voĉojn de la plejparto de la geeŭropanoj.

Jes, veras ke ni vivantas novan fenomenon: la Eŭropo de la renaskiĝo de rasismo, la stariĝo de malamo al la fremdularo kaj maltolerema Eŭropo kiu jam ekas dikigi la vicojn de la tiel nomataj ultradekstraj partioj.

Mi esperas, sincere, ke ni reagu ĝustatempe.

*Teresa Gutiérrez*

# JIMMY

(asture)

Tamién los caballos muerren. Pero yo nun sabía lo que la muerte significaba exactamente, lo qu'escondía la madera nel so corazón de tiempu. Nun entendía entá les palabres que-y decía la voz de la fonte al que namás conoz en llabiu la estraña llingua de la sede.

Yera brano. Pela piel dorao de los díes madurecía la lluz qu'indaora afuxe, la edá d'unos díes que nun son más qu'un rellumar en mediu de la nueche, una sorrisa nel rostru d'un home llamáu naide, unes palabres escrites y borraes, de contino escribiéndose y esborrándose, pero que perduren pa ti, que tienes frfu esta nueche y busques nelles aquello que perdiesti, una imaxe desfigurada agora de la vida. Llamábase Jimmy y na mirada caltenía l'orgullu d'una raza de guerreros, vencíos en Fort Apache, en Carelia, n'Hungría.

Nel so nome retinxía l'adolescencia qu'hubi tener y nun tuvi, nel so nome taben les playes tendies al atapecer de Manila, nel so nome taba lo que quixi ser y nun fui quien pa ser, taba la carta que nunca nun llegó, o nun la escribieron, y el veleru siegue aende, agrandándose.

Porque tamién los caballos muerren y mansos nun crecen yá la secreta sienda del monte. Malapenes son la sombra abandonada nuna peña, la raíz del fresnu infeliz. Porque tamién los caballos muerren, como habrá morrer l'istante nel qu'aparez un camión que lleva el galopiar de los díes camín del mataderu.

## XUAN BELLO (1)

Ankaŭ ĉevaloj mortas. Sed mi ne sciis tion kion morto signifis ekzakte, tion kion kaŝis ligno en sia koro el tempo. Mi ne komprenis ankoraŭ la vortojn kiujn diris la voĉo de la fonto al tiu kiu nur konas surlipe la strangan lingvon de la soifo.

Someris. Sur la ora haŭto de la tagoj maturiĝis la lumo kiu daŭre fuĝas, la aĝo de tagoj kiuj estas nenio krom lumado meze de nokto, rideto sur la vizaĝo de viro nomita neniŭ, skribitaj kaj forviŝitaj vortoj senpaŭze skribataj kaj forviŝataj, sed kiuj longdaŭras por ci, kiu sentas malvarmon ĉi-nokte kaj serĉas en ili tion kion vi perdis, bildo de vivado nun misformita. Li nomiĝis Jimmy kaj en sia rigardo entenis la fieron de raso de batalistoj, venkitaj en Fort Apache, en Karelio, en Hungario.

Ĉar ankaŭ ĉevaloj mortas kaj obeeme plu ne suriras la de la monto. Ili apenaŭ estas la ombro forlasita sur roko, la malfeliĉa frakseno. Ĉar ankaŭ ĉevaloj mortas, kiel devos morti la momento en kiu aperas ŝarĝaŭto survoje al la buĉejo.

En lia nomo ĉhis la adolesko kiun mi devis havi kaj ne havis, en lia nomo estis tio kio mi volis esti kaj mi ne kapablis esti, estis la letero kiu neniam alvenis aŭ kiun ili ne skribis, kaj la velŝipo daŭre estas tie, pligrandiĝante.



I- plimalplia prononco: ŝuan' bejo



# MESAĜOJ

Kiam ni komencis la eldonaĵon de nia eta revuo ni promesis al niaj gesamideanoj kaj leteramikoj ke ĉiun semestron aperos kun nova numero.

Iom post iom ni plenumis nian promeson kaj ni estas tute kontentaj pro la bona akcepto kiun nia modesta laboro estas ricevinta en ĉiuj partoj de la mondo en kie ni havas gekorespondantojn.

“Antaŭen” en Interreto!! Ekde antaŭ iuj monatoj vi povas konstati ke en nia titolpaĝo figuras nia elektronika adreso. Lastatempe ni ĝin ŝanĝis, do prenu bonan noton pri tio! Jen la novaĵo:



**esperanto@asturies.org**

Tutcerte ĝi estos nia ĉiama adreso, retroŝtu al ni per ĝi tial sentime, ĝi espereble plu ne varios.

Ni vere ĝin ne uzas ankoraŭ tiel ofte kiel ni devus –ni ne estas fakuloj!–, sed ni promesas ke, iom post iom, la membroj de nia grupeto informiĝos pri komputil-laborado.

## **Nekrologo:**

Dum la nuna jaro –monato februaro- forpasis en San Pau d’Ordal –Barcelono- nia bona amiko Luis María Yzal, honora membro de UEA kaj fondinto de tre fama Hispana Esperanto-Muzeo en la jaro 1966.

Ankaŭ ni doloras pro la forpaso de aŭstrala amiko Austin, edzo de nia tre bona amikino kaj kunlaborantino de nia revuo Patricia Harkin. Por ambaŭ ni petas elkore: Ili ripozu pace.



Niaj Geamikoj!



Kiam mi parolas kun diversaj homoj, unu el la argumentoj antaŭen metitaj estas: E-o estas artefarita lingvo. Tio dirita kun tono de malŝato, eĉ malestimo. Sed, fakte, kion signifas “artefarita”? Laŭ etimologio la signifo estas “farita per arto aŭ arte”. Do E-o estas farita dank’al arto, kial malŝato?

Ni vivas en artefariteco. Kion ni povus sen ĝi? Ni loĝas en domoj artefaritaj, ne en naturaj grottoj. Ni uzas veturilojn entenantajn en la motoro artefaritajn ĉevalojn. Ĉu ni dormas tuj je la sunsubiro kaj ellitiĝas nur post la sunleviĝo? Ĉu ni povus vivi sen artefaritaj lumoj? neniam mi aŭdis iun malŝati artefaritan lumon. male, li koleras kiam okazas elektra paneo.

Kion diri pri la komputiloj? Kiam nun oni parolas kun admiro pri “artefarita inteligenteco”, ĉu vi aŭdis malfavoran tonon? Kial rezervi tian tonon kaj sintenon por E-o?

En la ĉiutaga vivo, la homoj oponas al artefarita la vorton: natura. En la vortaro ni legas la difinon de “natura”: tio kio en la Universo okazas spontane sen interveno de kalkulo, pripenso, volo, nocioj rigardataj kiel homa propraĵo: ĉio kio ekzistas sen homa ago.

Multaj pensas ke ĉio en la naturo estas bona. Ĉu vere? Ekz.: mortigaj fungoj, multaj venenaj plantoj, naturaj katastrofoj. De ne tre longe oni parolas pri materialo, ja danĝera, sed multe uzitaj en konstruaĵoj! Asbesto, tamen natura!

En artikolo (pri natura manĝaĵo) mi legas “La vorto natura estas unu el tiuj vortoj kiujn oni uzas tiom pli ofte, ke tiuj kiuj ilin aŭdas aŭ eldiras tre malofte ligas al ili precizan ideon. Kiu skribis tion? Condorcet (franca filozofo (1741-1794), “Pano kaj vino estas produktoj el homa genio, kaj la naturo mem estas mirinda artifaĵo. J. Jaurès (franca politikulo (1859-1914). “La artifaĵo fariĝis tiel kutima, ke la naturaĵo ekŝajnas artefarita”.

Kaj la lingvoj? Naturaj? “Estas eraro diri ke ni havas naturan lingvaĵon: la lingvoj estas arbitrare faritaj, kaj popolaj konvencioj”. Ĉu estas mi, kiu inventis tion? Tute ne! Rabelais (1491-1553) skribis tion multe da tempo antaŭ la apero de E-o.

Ĉu E-o estas artefarita? Jes, dank'al konstrua arto de Zamenhof. Mi preferas uzi "konstruita" aŭ "konvencia". E-o estas sintezo de lingvoj ekzistantaj. Kiuj iomete studis ĝin, tiuj bone scias ke ili trovas radikojn, turnesprimojn de sia nacia lingvo, de ĉiuj lingvoj eŭropaj aŭ ne.

E-o artefarita? Jes, dank'al konstrua arto de Zamenhof. Kaj la konstruo daŭras per aldonoj de la parolantoj, konstantaj aldonoj; ĉu la aldonoj de la E-oparolantoj estas naturaj, artefaritaj? Nur la Fundamento estas netuŝebla. Ĉiuj rajtas proponi neologismojn kiel por aliaj lingvoj. Kiam oni uzas ekz. la vortojn "laser" aŭ "radar", ĉu estas artefariteco? Tiuj vortoj estas sigloj, akronimoj, kaj E-o glutas ilin kiel la aliaj lingvoj.

Vi diras "mi aĉetis naturajn rozojn"; vi subkomprenas ke ili ne estas el papero. Sed ĉu vi konscias, ke rozo estas artefarita floro? Neniu rozo estas natura: vi trovas ilin en ĝardenoj, ne sur la kamparo. La nura natura rozo estas eglanterio, la homoj prilaboris ĝin kaj kreis rozojn per arto. Antaŭ nelonge mi legis en katalogo "jen la nova rozo kreita de la kreisto Delbard". Tiu viro kreis rozon per arto, same kiel Z. kreis E-on per arto. Ambaŭ estas artefaritaj.

Ni povas same diri pri ĉiuj plantoj kulturitaj. Plantaj varietatoj estas ĉiuj artefaritaj: florbrasiko, senkernetaj oranĝoj, piroj, ktp...

Cetere tiuj plantoj ne interesas la naturalistojn, kiuj herbokolektas sur la kamparo la sovaĝajn plantojn. Nur la flor-frukto-legomkulturistoj interesiĝas pri ili. Ĉu tio signifas ke ili ne valoras? Tute ne. Ili eĉ multekostas en la vendejoj. Aŭskultu kion diras Buffon (1707-1788): estas plantoj kies naturo estas por tiel diri artefarita kaj nenatura: ekz. tritiko estas planto kiun la homoj modifis tiagrade, ke ĝi ekzistas nenie ajn en natura stato.

Per tiuj diversaj argumentoj ni ne pretendas konvinki niajn ĉiujn kontraŭulojn. Tamen, kelkaj iomete pripensos la aferon kaj eble hezitos antaŭ eldiri la vorton artefarita kiel ili ĵetus insulton al E-o.

*Suzanne Authier* (FRANCIO)



## ALZACAJ FOLKLORAJ VESTAĴOJ

La vestaĵoj estas rekonilo de la regionoj, de la religioj kaj de la sociaj klasoj.

La kamparana vestaĵo, tiel kiel ni ĝin konas aperis nur je la XIXa jarcento. Ĝi estas la respreguliĝo de la socia klaso, de la konfeso, de tiu kiu surmetas ĝin.

La kufo estas sendube la plej grava elemento kaj la plej distinga de la ina vestaĵo. Nuntempe la nodkufo kiu simbolas la alzacinan vestaĵon estas freŝdata fenomeno. Nur ĉirkaŭ 1830 ekaperas en "Brumath" kaj en la regiono de la "Kochersberg" la fruntnodeta kufo.



En la jaro 1860, la virino de la Haguenaŭa kantono surmetas akran ruĝan nodetokufon kiu similas al kresto, de tie la nomo de "Kridekapp" aŭ "kridel" signifanta "kresto".

Tiu fronta nodeto disvolviĝas ekde 1840 en la "Kochersberg" kaj en la regiono de "Hanau" por atingi 23cm larĝa (por la rubando). Ĉirkaŭ 1860, poste ĝi atingas 27cm je la fino de la XIXa jarcento.

Tiu kufo nomata "schupfkapp" nodkufo estas vestata en la regiono de Erstein, sude de Strasbourg "Strasburgo", ĝis la norda limo de la haguenaŭa arbaro, kiu reprezentas nur kvaranon de la alzaca surfaco.

La koloro de la kufo estas unue vestata laŭ la religio.

La protestantaj junulinoj kaj la geedzinitaj virinoj sisteme sur-metas nigran kufon.

La katolikaj junulinoj surmetas nodkoloran kufon, tiu koloro varias laŭ ĉiu vilaĝo. Nur la geedzinitaj katolikaj virinoj surmetas nigran nodon.

La protestantaj virinoj kaj la junulinoj surmetas verdajn, viol-kolorajn, ruĝajn, brunajn, blujn jupojn, kiuj ornamiĝas ĉirkaŭ 1850 per florvelura rubando aŭ per unu aŭ pluraj nigraj rubandoj. La nombro de la rubandoj varias laŭ la riĉeco de la junulino.



La katolikaj fraŭlinoj kaj virinoj de la "Kochersberg" regiono surmetas simple ruĝan jupon kordonita per nigra velura rubando.

*Odette Scheidel* (Francio)

# Garcilaso de la Vega

*En la 500-jara datreveno de la naskiĝo de la poeto.*

Naskiĝis la poeto Garcilaso, en Toledo, la jaro 1501. Brila renoviganto de la kastililingva poetiko, li estis perfekta modelo de la kortegano renesanca. Dum sia mallonga vivo, li kunigis la idealajn elementojn kiel homo de armiloj kaj de beletro, ĉar samlerte li uzis armilon kiel plumon, kaj tial lia vivo estis, konstanta batalo por amo, poezia kreado kaj heroaĵoj.

Ĉar ne fermita al ĉiuj spiritaj ideoj kaj novaĵoj de sia epoko, li kun Boscán adaptis al la kastililingva liriko la modernajn italajn versoformojn, inter ili la soneton, kiu fariĝis de tiuj tagoj la poetika formo plej uzata dum la renesanco kaj la beletra hispana orjarcento. Jen unu el tiuj sonetoj de li verkita:

*En mi skribitaj viaj ĉarmoj restas  
kaj se verkadi pri vi mi deziras  
sufiĉas via belo tre altira  
jen vi aperas linda kaj majesta.*

*Mia inklino al vi ja aŭtentas,  
ĉar mi la ecojn viajn tre admiras  
pro am' al vi konstante mi sopiras  
laŭ mia kor' kaj sentoj vin atentas*

*Nur la beleco via min plej ravas  
Kaj mi pri tiom granda am' mi miras  
Kiom l' animo mia ĝin surportas...*

*Inspiron ŝuldas mi al vi bril-havan,  
por vi mi vivas kaj dolĉege spiras,  
pro vi mi devas morti kaj...mi mortas!*

Antonio Marco Botella



*Garcilaso de la Vega*

Subskribo de Garcilaso

## STELO DE LA FRATECO

Rigardu! Brilas ĝi! Ho! Frato kaj amik'  
Kaj krii pri la nom' al punktoj kvar de l'mondo  
Estu la mesaĝist' kaj la profunda sem'  
La grajno baldaŭ ĝermos en la promesita sulko



Jen la stelo de la fratec'  
Kiel ornajlo en la homa koro  
ĉar el amo venas lumo  
feliĉo, paco por la homoj  
pere de la frateca stel'

Per la malsama voj' ni paŝas kiel  
vi

sub la natura fort' kaj suferante same

Ne volas koni mi vian koloran haŭton  
Nia fluanta sang' el sama fonto ŝprucas

Prisemu per la am' la mondon de la hom'  
Por abunda rikolt' ĉiam renovigita,  
Soifo kaj malsat' tiam malaperintaj  
Kaj falos la armil' por premado de manoj.

Poemo tradukita de **F. Terral** laŭ teksto de E. Sansoube



Amuĝaĵoj



CÍSIMO

## TRABUTIKADO

Iun matenon je la 9a pluvis, kaj subite la suno aperis. La ĉielo iĝis definitive sennuba.

De frue Sinjorino Antonja butikalbutike promenis, portante sian pluvombrelon ĉe la maldekstra antaŭbrako. Ŝi multe babilis kun la ge-aĉetontoj, ĉar ŝi konas ĉiujn. Ŝi mem malmulte aĉetis; "groŝo estas groŝo" ŝi ripetis, kvankam ŝi estis la plej riĉa el la vilaĝo.

Fine post tri-hora klaĉado ŝi rehejmeniris... sen la ombrelo! "klaĉastrofo". Ŝi do revizitis ĉiujn vendejojn:

-Hola, Alberto! Aŭskultu min! Mi forlasis mian pluvombrelon ĉi matene, kie ĝi estas?

-Nenie, mi ne havas ĝin.

-Ha! Kia kraĉastrofo!

Alibutike:

-Hola, Peĉjo! Pardonu! Antaŭ du horoj kiam mi aĉetis haringon, tiam mi lasis ĉe vi mian ombrelon, kie ĝi estas?

-Nenie-ĉi, mi ne havas ĝin, vidu vi mem!

-Ha! Kia katastrofo!

Trie:

-Hola Ĝjuzeppina! Re-saluton! Hodiaŭ frumatene mi forlasis ĉe vi mian ombrelon, kie ĝi estas?

-Tonja, senkapa Tonja! Vidu! Ĝi ja angore atendas sian mastrinon tie, en tiu angulo. Vidu: ĝi ploris litron da pluvakvo sur mian plankon!

-Ha! Dankon, kara, vi Ĝjuzeppina, almenaŭ vi estas honesta!.



## Solvo antaŭa revuo

A PARIS	1 POTAS
B OTARI	2 ATELO
C TEPID	3 RAPID
D ALIZE	4 IRIZA
E SODAJ	5 SIDEJ

### PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por Publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)  
Sendu al:

**CÍSIMO R. SIMON**  
c/ La Magdalena nº 26 - 1º D

# BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

Bassegoda, 40, 3<sup>o</sup> 1<sup>a</sup>  
Teléfono 93 333 80 81  
E - 08028 BARCELONA (Hispanio)

Okaze de la 25-a Jubileo BEC, ĝi organizas  
kunvenon por BEC-amikoj sub la nomo

1-aj Someraj Dialogoj Esperanto-Restadejo

**6-7-8an de septembro**

**Cami del Pou 9,08691  
Monistrol de Montserrat**

Barcelono, Hispanio  
Tel. 679 71 59 82



Prezidanto  
Salvador Aragaj

BARCELONA  
ESPERANTO - CENTRO